# Film-spektante pri la hispana konstituciismo






Filmo de la jaro 1966, kies direktoro estis F.Iquino. Temas pri la kreado de la polica korpuso “Civila Gvardio” en la jaro 1844 fare de la Duko de Ahumada. Tamen oni ne pritraktas la biografion de tiu historia elstarulo, sed estas filmo kun fikciaj protagonistoj kiu havas kiel fono historiaj faktoj. La naskiĝo de tiu polica korpuso estas respegulita ene de scenaro kiu reliefigas la homajn valorojn de ties kreintoj.

La scenaro de la fikcia historio prirakontata de la filmo estas melodrama: Jaro 1840 (lasta de la Unua Karlista Milito), la karlista kapitano Fernando-del-Castillo rezultas venkita dum atako de la registaraj trupoj. Post la finiĝo de la milito li revenas al Kordovo kaj konstatas ke lia domo estis konfiskita kaj lia frato edziĝis al la virino kiu devis esti sia edzino. La Duko de Ahumada, konscia pri la valoro de la militisto, oferas al li postenon en la ĵus kreita korpuso de la Civila Gvardio. Baldaŭ komenciĝos la operacioj de kaptado de banditoj kaj protektado de la popolo kontraŭ la ekspluatado de la kacikoj…

La filmo estis farita dum la diktaturo de F. Franko, do la ideologio de tiu reĝimo neeviteble enŝoviĝis en la ĝia scenaro. La ĉefa figuro estas karlisto, la kacikoj estas liberalistoj… Ni scias kion multe ĉi lasta tute ne estis vero: la Civila Gvardio estis kreita de la moderistoj por kontraŭbatali ne nur la banditojn sed ankaŭ la progresistojn kaj revoluciulojn.